

LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ

Aperas monate. Jara abono Kĉ 20.—, eksterlande Kĉ 25.— (por 10 numeroj). Specimen-numeroj Kĉ 2.— aŭ 2 resp. kuponoj. — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. — Administrejo: Jos. Brožík, Plzeň, Prokopova tř. 9. — Konto de la Pošta ŝparkaso ĉs. n-ro 5203, aŭstria n-ro 169.352. — Telefono 718/VIII. La manuskriptojn oni ne resendas.

J. PECH:

NIA XIV.

La 1. sept. frumatene mi forveturis el Plzeň al Cheb (germ. Eger), la lasta landlima stacio de nia respubliko. Post la kontrolo de pasportoj kaj de valizoj mi veturis al Leipzig, kie mi aĉetis diversajn librojn kaj fotopladojn por povi dumvoje fotografi kaj alporti bildojn por rememoro eĉ por propagando. Promenante tra la urbo, mi renkontis tri germ. samideanojn, kiuj helpis min volonte kaj sukcese, ĉar mi ne parolas germane. En la urbo regas mirinda pureco kaj mi preskaŭ ne volonte ĝin forlasis la morgaŭ. La »fera ĉevalo« portis min en la germ. ĉefurbon Berlin, kie tuj post mia alveno mi vizitis amikon Sprueck, red. de »Arbeiter-Esperantist«. Mi neniam forgesos la afablecon, per kiu mi estis akceptita de li kaj de lia juna edzineti, kiuj forlasis min nur antaŭ noktomezo, sidiginte min en fervojan vagonon, kiu min forportis en Stetin, kie la samideanoj en la stacidomo atendis kun esp. flagetoj en la manoj. Ili aranĝis amikan kunvenon, kie parolis siajn salutojn la delegitoj el Aŭstralio, Francujo, Holando, Italujo, Ĉeĥoslovakio k. a. Je la noktomezo oni iris dormi por refreŝigi al daŭrigo de la vojaĝo per la ŝipo »Rügen«. Feliĉe ĵus estis finita la striko sur tiu ĉi ŝipo kaj oni anoncis tion al ni jam vespere, ĉar ni timis, ke ni ne povos forveturi. La lokaj samideanoj zorgis pri ni tre bone, ili akompanis nin en la havenon kaj restis tie kun ni ĝis la forveturo de la ŝipo, bedaŭrante, ke pro malbona valuto ili ne povas veturi kun ni. Nia »Rügen«, ornamita per esp. flago, malrapide komencis malproksimiĝi de la bordo, post kelkaj minutoj ni rimarkis nur flirtadon de flagetoj, fine la bordo malaperis tute kaj ni estis sur vasta maro. Ĝia nivelo brilis kiel spegulo kaj la oraj sunaj radioj kisadis la rideman Baltikan maron. Post trankvila nokto venis varmega tago kaj la sunradioj kvazaŭ trapikadis nin. Sed jam post la deka la ĉielo komencis nubigi kaj la maro estis maltrankvila. La ondoj kreskis, krakis

kaj batis la flankojn de nia ŝipo, kiu fariĝis illia ludilo. Jen ili formis profundan abismon, jen akvan monton, kiu ŝprucis blankan ŝaŭmon sur nian ferdekon, malsekigante personojn eĉ objektojn tie troviĝantajn. La ŝipŝraubo pene laboris kontraŭ la malamiko kaj ĝia bruado senrervigis nin. Nia turmento finiĝis nur la duan tagon antaŭ la noktomezo.

La trian tagon ni feliĉe atingis Revalon, la ĉefurbon de Estonujo, kiu jam de malproksime vidigas siajn turojn kaj kamentubojn. De tie nia celo jam ne estis malproksima, ĉar jam post kelkaj horoj ni ekvidis bluan zonon de tero, rapide proksimiĝantan. Baldaŭ ni rimarkis konturojn de pintaj turoj kaj de grandaj konstruaĵoj, nian celon, la nunjaran »Esperantujon«. Jen belega, mirinda Finnlando la prikantata lando de gastamaj Finnoj, la lando de mil lagoj! Ni naĝas preter la fortikajo Sveaborg, kie dum la »civitana milito« estis malliberigitaj pli ol 11.000 socialistoj, el kiuj mortis 3.500 pro malsato. Ni preternaĝas kelkajn insuletojn kaj ni jam estas en la urbo, kie troviĝas multaj grandaj ŝipoj kun diverslandaj flagoj kaj nun nia »Rügen« kun sia esp. flago aliĝas al ili. La lokaj samideanoj jam atendas nin. Nian atenton vekas granda tabulo kun surskribo: »Ĉiu samideano legu tuj la praktikajn informojn, kiujn oni ricevos post nontro de la kongreskarto!« La neagranda traserĉo de valizoj, kiu estis en Stetin, post nontro de la kongreskarto estis pardonita. La informaj dokumentoj enhavis tre valorajn helpilojn, unuavice la adresen de la hotelo aŭ de privata loĝejo kaj gvidilon tra la urbo, en kiu estis markita vojo al la loĝejo. Ĉar ĉiu tuj donis siajn pakaĝojn en sian loĝejon, li povis tute libere uzi sian tempon por promeni tra la urbo, kaj danke al la gvidlibro oni tien faris kvazaŭ en sia hejmurbo, spite, ke Helsinkfors havas ĉirkaŭ 200.000 loĝantojn. En la kongresa libro oni trovis tutan, precizan programon de la kongreso kaj de ĉiuj aranĝoj dum la kongresa semajno. Krom tio oni povis trovi la programon de ĉiu tago en la Akceptejo sur nigra tabulo. La kongres-

libro estis por ni vera trezoro. Ne senkaŭze estis skribite en la Akceptejoj: »Ne demandu tro multe, la kongresa libro scias pli multe ol ĉiu el la komitatanoj!« Ĉiu kongresano ricevis kongr. insignon kun rubando: por fremdlandanoj verda, Finnoj blua-blanka kaj helpkongresanoj flava. Por fremduloj estis tiu arango tre praktika ĉar en okazo de bezono ili povis sin tuj turni al la enlandano.

Tuj la unuan tagon, irante kun kamarado Kostiainen kaj so. Setälä mi renkontis son. Valno Melli, red. de »Suomen Socialidemokraatti«, kiu forkondukis min en la redakcion de la gazeto kaj konatigis min kun aliaj redaktoroj, el kiuj kelkaj estas deputitoj. La gazeto aperas en 25.000 ekz. kaj dum la kongreso ĝi alportadis esp. artikolojn. Oni kondukis min ankaŭ en la laboristan domon, kiu dum la »civitana milito« estis ruinigita kaj nun estas restarigita. En Finnlando estas malpermesite trinki alkoholaĵojn kaj tial ankaŭ en la haloj de la lab. domo oni ilin ne vendas. Eĉ fumi estas malpermesite tie ĉi. Mi bedaŭras, ke mi ne povas detale priskribi ĉion: ĉar la redakcio bezonas lokon ankaŭ por aliaj artikoloj.

Marde la 8. aŭguston je la 11. horo okazis la festa malfermo kiun ĉirkaŭ 900 personoj el 31 diversaj landoj kaj multaj eminentuloj ĉeestis. Post ludo de la finna kaj esp. himnoj salutis la kongreson la finna min. de instruado so. V. Loimaranta. Poste la prez. de la Konstanta komitato de la kongresoj (K. K. K.) so. Mabon Warden proponis jenan estraron: K. von Frenckell, prez.,

FELIETONO

SEN-TEMA FELIETONO.

(Premiita en la I. konkurso de »L. Pr.«)

La redakcio de »La Progreso« donis tre malfacilan taskon: ĝi anoncis en sia maja-junia numero konkurson je felietono por sia gazeto.

Tiun-ĉi konkurson mi kompreneble devas partopreni. Unue ĉar mi estas abonanto de »La Progreso«. Verdire, mi ne pagas por la abonata ekzemplero, ĉar por la administracio de la gazeto ja ne estas grave, se unu homo ne pagas. Ĝi ja ne riĉiĝos pro mia abonpago, dum mi povus efektive tute bankroti, se mi estus paganta por la tuta aro da gazetoj esperantaj, ricevataj de mi. Kaj krom tio la administracio ĝoju, ke ĝi havas unu abonanton pli. Tio ja estas nombro, kiu por multaj gazetoj signifas de 20 ĝis 50 procentoj de la tuta abonantaro. Cetere ĝi danku ankaŭ min, ke mi ne postulas de ĝi monsubtenon por mia esperantista agado kaj ne petas alsendon de senpagaj ekzempleroj al gravaj personoj, nepre esperantigotaj, kiel ekzemple la duonjara solfido de ĉi-tiea akademia pordisto k. t. p.

Sed mi iom deflankiĝis kaj tial »ni revenu al niaj ŝafidoj« kiel diras la francoj, bone posedantaj Esperanton kaj ĝian internacian spiriton.

A. Sandstrem kaj dro. E. Privat, vicprez. Kiel naciaj vicprez.; H. Sakaria por Estonio, John Merchant por Britujo, A. Pitfik por Ĉ. S. R., dro. Arnhold por Germanujo, Eessigman por Polujo. Gen. sekr.: Gabr. Chavet, sekr.: V. Setälä kaj H. Jakob. So. dro. Kamarýt, la prez. de la XIII. ne alvenis. So. Frenckell parolis finne kaj svede pri Esp. kaj esper.. li bonvenigis la alvenintojn, ĉefe sinon. Zamenhof kaj finis per konvinkaj vortoj pri sukceso de nia movado. La festparolado de dro. Privat, kies elokventeco estas fame konata, estis vere kortuŝa. Poste parolis oficialaj delegitoj de diversaj gravaj institucioj kaj de ministerioj (la ĉs. min. de publika instrado reprezentis prof. Stejskal el Praha) kaj poste sekvis la naciaj delegitoj. La tagojn sekvintajn okazis kiel kutime diversaj kunvenoj fakaj (laboristoj havis tri kunvenojn kie partoprenis sep nacioj sub prezido de so. Kostiainen kaj kie oni deklaris la neceson de neutrala movado de labor. espistoj). Pri amuzo kaj refreŝiĝo en la naturo zorgis la arangantoj de la kongreso tre bone. La koncerto de Sumen Laudu, la teatro, kie oni ankaŭ montris la naciajn dancojn, ekskurso al Munkkiniemi, koncerto de laborista inst., internacia balo, veturo per militŝipo »Vallisaari«, vizito de Wiipuri kaj de la akvofalo Imatra, ĉio, tute ĉio ravis nin kaj ni neniam forgesos la tempon tie travivitan.

La solena fermo de la kongreso okazis marde 15. aŭg. kaj tie ĉi mi povis fari mian alparolon en la nomo de Lab. Ligo Esp. de Ĉeĥoslovakio. Jen oni danke akceptis la invi-

Do, la unuan kaŭzon mi jam klarigis al vi. La dua kaŭzo estas tre simpla kaj samtempe treege grava: mi devas partopreni la konkurson, ĉar mi estas ne nur abonanto, sed ankaŭ Esperantisto. Kaj ĉiu Esperantisto, se li ne estas Lingva Komitatano, Akademiano, prezidanto de ia vilaĝa Internacia Asocio, aŭ »diplomita profesoro«, estas nepre literaturisto. Do, konsiderante, ke Esperanto ne havas laŭ sia Fundamento iajn ajn esceptojn, ankaŭ mi estas Esperantista literaturisto. Tion povas nei neniu redaktoro de »Progreso«, malgraŭ ke li uzas la nefundamentan »io« anstataŭ la »ujo«.

Do estas klare, ke partopreni mi nepre devas. Sed, ho granda Dio de ateistoj, la ruza redakcio, kiel mi jam diris, donis tre malfacilan taskon. Unue, ĉar la felietono devas esti proze verkita. Kaj mi, kiel vera sentemulo ja preferas poezion. Ho, kiel belan kortuŝigan versaĵon mi skribus por la konkurso! Ekzemple, la jenan:

Mia verda stel'
Tre estas vi bel'
Kiel nia cel'
Kaj urso fel'

Kun vi en paro
Iros al maro
Malgraŭ la baro
Mi sen staro!

ton de bavaraj samideanoj, aranĝi la XV. en Nürenberg. Ĝin varme rekomendis so. Privat, memorente samtempe la unuan germ. pioniron de Esp. son, Trompeter, kiu jam dormas dormon eternan. Vespere, la saman tagon estis aranĝita en la »Nobelara domo« laborista festo, kiun partoprenis krom la lokaj laboristoj ankaŭ multaj deputitoj kaj redaktoroj.

La kongreso estis finita kaj post kelkaj ekskursoj mi denove enŝipiĝis en Helsingfors la 19 aŭg. Kun multaj samideanoj, inter kiuj estis ankaŭ sinc. Zamenhof, mi forlasis Finnlandon, la gastaman landon — por ĉiam.

La belaj kongrestagoj estas for. La memoroj doloras eĉ ĝojigas. Ili doloras per la scio ke tiu bela tempo ne plu revenos, kaj ili ĝojigas atestante, ke la XIV. estis nova triumfo de nia movado, la triumfo, pri kiu mi mem povis konvinkiĝi en la familia rondo de samideanoj.

La XIV. pasis. Vivu la XV.!

oooo

ESPERANTO ĈE LA LIGO DE NACIOJ.

La III. kunsido de la L. de N. traktis denove pri Esp. Antaŭe tiu afero estis pridiskutata en la V. komisiono de la Ligo. (La Ligo dividas siajn laborojn inter ses komisionojn, kie ĉiu lando estas reprezentata per unu persono. La demando pri Esp. iris al la komisiono V., pri sociaj kaj homaraj aferoj.)

Rimarku nur bone, ke kiel granda talentulo, mi tute ne uzas la sufiksajn rimojn. Kaj dum ĉiuj eĉ plej geniaj poetoj rimigas nur 2 liniojn, mi rimigas ĉiujn kvar, kio estas malfacilega, eĉ se oni posedas la Parisot' an Esperantan rimaron. Kaj atentu la fortecon de mia esprimpovo: »bela kiel urso fel'« aŭ la zamenhofecan simbolecon en la dua parto de la versaĵo.

Sed la ruza redakcio de »La Progreso« tion antaŭvidis kaj tial ĝi postulas felietonon, sed ne versaĵon. Nu, estu tiel: la veran geniulon

... »jam ne timigas la ĉefredaktoro, nek prozo-kondiĉo, nek batoj de l'koro, ĉar saĝa kaj granda kaj tre instruita Mi estas, geni' grandigita!«

Tamen ankoraŭ unu malfacilaĵon elpensis la ruzuloj el »La Progreso«. La temo estu laŭvola, sed interesa. »Jen staras la azenoj apud la monto«, kiel diris iam mia germanlingva kamarado, ne povante solvi la ŝakproblemon en Geneva »Esperanto«. Kiel venki tiun obstinan baron? Ĉu laŭ Zamenhofa konsilo »per la sankta amo«? Sed tio ja ne helpas. La kondiĉoj efektive estas terurigaj: »laŭvola kaj interesa«. Por kiu ĝi estu interesa? Por poŝtmarkkolektantoj, vendantoj de pasintjaraj kalendaroj, junaj fraŭlinoj, sendentaj maljunulinoj, »uj-anoj«, »i-anoj«? Ĉu tiu nekaspabla, nesperta, sentalenta redaktoro ne scias tion,

La Komisiono okupis sin per Esp. en tri kunvenoj (La 12., 13., kaj 14. sept.) kaj la diskutoj estis tie tre viglaj eĉ interesaj. La raporto de la ĝen. sekretario de la Ligo, sur kiu baziĝas la diskutoj, estis tre preciza kaj por Esp. tre favora. Sed tio ne plaĉis al kelkaj kontraŭuloj de Esp. ĉefe al la brazila delegito so. de Rio Branco, kiu diris, ke la »Ligo ne devas subteni la artefaritan lingvon de mizeruloj, kaj komunistoj, sen tradicio, sen literaturo-sen intelekta valoro. Se oni malfermos la pordon al Esp., ĝi celos forigi la naciajn lingvojn!« Feliĉe la plimulto ne konsentis kun tiu ĉi opinio kaj ĉefe la delegitoj de orientaj landoj (Japanujo, Ĉinujo kaj Persujo) akcentis la gravecon de Esp. kiel lingvo internacia. Jen la esperantistaro denove ŝuldas grandan dankon al nia eminenta »sub-Majstro« dro. E. Privat, kiu sentante la necesecon de sia aktiva partopreno en la diskutoj, ĉeestis kiel — persa delegito. Tre favore pri Esp. parolis ankaŭ la delegitoj de Finnlando kaj de Suda Afriko. La komisiono akceptis la proponon de la franca delegito Reynald, kiu estis akceptita per 18 kontraŭ 8 voĉoj: »La demandoj pri instruado de Esp. estu resendataj al la Komisiono pri Intelekta kunlaborado, por ke ĝi donu sian opinion pri la diversaj punktoj de la problemo de helpa lingvo internacia«. Krom tio la Komisiono decidigis fari en la raporto de la ĝen. sekretario de la Ligo ŝanĝon (pri rekomendo de artefarita lingvo en poŝta kaj telegrafa uzado) kaj kompletigi ĝin per la raporto de la Pariza komerca ĉambro pri Esp. kaj per la memo-

kion ni, veraj poetoj-superhomoj, sentas ĉiusekunde, ke estas diversaj homoj en nia vastega Esperantujo kaj ke ili havas diversajn »interesojn«. Do, kial li faras tian strangan kondiĉon? Aŭ eble tio estas nur ruza kaptulo por ke la redakcio ricevu multajn manuskriptojn por sia gazeto kaj donu al neniu la premion, simple deklarante, ke ĉiuj temoj alsenditaj estas neinteresaj. Kaj poste — »temo laŭvola«. Kial la redakcio ne difinis la temon? Kial mi devas serĉi la temon? Ĉu mi havas nenian alian laboron? Kaj se mi okaze ne povas trovi temon en la daŭro de tiuj 4 monatoj ĝis la 15-a septembro? Ĉu mi estas devigata tiam malgraŭ mia geniececo ne partopreni la konkurson? Ĉu la redakcio deziras, ke mi ne ĝuu almenaŭ unufoje mian nomon, presitan per efektiva nigraj preslitteroj sur efektiva paĝo de efektiva esperanta gazeto, kia estas »La Progreso«? Ĉu la malmolan koron de la redaktoro ne tuŝos eĉ tiu mia flato-aprobo, tiel grava por la progresigo de »La Progreso«?

Kion do mi faru? Temon mi ne havas, skribi mi devas kaj la tempolimo alproksimiĝas per gigantaj paŝoj.

Aŭ eble mi skribu tute sen-teman felietonon? Sed mi, sent-emulo kun la poeziplena koro, ja ne povas, tute ne povas tion.

Kion do fari, kion?

Sen-tema Sent-emulov.

randumo de la Brita ministerio por publika instrado, kiuj ambaŭ estas favoraj al Esp. Kiel raportisto por la ĝenerala kunsido de la Ligo estis elektita so. Reynald (Francujo).

La ĝenerala kunsido de la Ligo de la Nacioj traktis pri Esp. jaŭde la 21. sept. La raportisto so. Reynald sciigis, ke dum la kunsidoj de la V. Komisiono montriĝis diversaj opinioj. Venkis meza opinio, kiu konstatis faktojn kaj deziras opinion de kompetenta sciencularo. Li proponas, ke la Ĝenerala kunveno ĝin aprobu. Dume Esp. havos plenan kampon por disvastiĝi kaj pruvi sian utilcon per sukcesoj, kiujn ĝi gajnos. Post la vortoj de Lord Robert Cecil (Sud-Afriko), kiu ĝojis pro la decido de la Komisiono akcentante, ke la intelekta komisiono devos memori, ke la mondlingvo estas bezonata ne nur de la intelektuloj, sed autaaŭ ĉio de la popoloj, kaj kiu konsideris kiel grandan sukceson por Esp. la riĉan raporton, korektitan kaj akceptitan de la Komisiono, la prezidanto de la Ligo so. Edwards (Ĉilio) lasis voĉdoni pri la unua parto (alprenado de la raporto pri Esp. kiel helplingvo). Ĝi estis akceptita ĉiuvoĉe. Poste la prezidanto voĉdonigis la parton duan (peton al la Intelekta Komisiono, ke ĝi donu sian opinion). Ĝi estis akceptita per 26 voĉoj kontraŭ du.

ooo

J. Šupichevá:

AŬTUNA MEDITADO.

Efektive multaj, tre multaj estas laŭ la nombro niaj laboristoj en la propagando »por la sankta afero«.

Multajn kursojn oni aranĝas en nia respubliko — oni senĉese paroladas, publikigadas, propagandas...

Kaj kiom da gazetoj estas eldonataj de niaj ĉefaj esperantistoj? Vere, oni povus kredi pri ni, ke ĉe ni estas la plej favoraj kondiĉoj, por ke nia ŝtato estu prave nomata »Esperantujo«!

Cu ne estas tiel? Ĉu la fremdlandaj gesamideanoj ne opinias tion ankaŭ pri ni? Kia estas la vera stato de nia movado? Ĉiujare centoj da nove naskitaj esperantistoj, kiuj ĵus finis sian elementan studon pri esperanto en la kursoj por komencantoj. La novaj verdsteluloj...

Jes, la verdan stelon ili fidele portas (precipe nia junularo) sed — alparolu lin esperante sur la strato aŭ en la kunveno — kaj la plimulto ne respondos esperante aŭ tre, tre malbone.

Mi jam aŭdas protestojn: »Ho, lando de la XIIIa! Centoj da ĉefaj esperantistoj — kaj inter ili dekoj da perfektaj, flue parolantaj, instruistoj kaj instruantoj, diligentaj kursgvigantoj, laboremaj delegitoj, jam tiom kaj tiom da ekzamenitaj — kion vi diras?«

Tamen mi kuraĝas demandi: Ĉu tio ne estas preskaŭ — krom malgrandaj esceptoj — ĉiam la sama j homoj, la bone konataj malnovaj ĉefaj esperantistoj?

Kie estas tiu senĉese kreskanta aro da novaj, nekonataj aliĝintoj al nia standardo, pri kiuj ni regule legas en nialandaj kronikaj raportoj? Ĉu ili ne finrestis? Ĉu ni ne havas la povon daŭre interesigi ilin? Ĉu ni ne scias la vojon por praktike montri al ili la rezulton de ilia lernado? Ĉu ni aranĝas la kursojn nur por konkuri per nombro en la gazeta kroniko?

Eble ni klopodas nur, por ke niaj kluboj, rondoj, rondetoj kaj societoj ne plendu pri malkreskiĝanta anaro? Kaj ĉu tiuj ĉi institucioj bone scias sian devon (estas tute egale ĉu »sanktan« aŭ »simplan«) al tiuj novuloj, kiujn la kursgvigantoj sendas al ili?

Multaj el tiuj ĉi novelernintoj venas inter nin kun entuziasmo — kion ni donas al ili?

Kia estas la ekstera kaj kia la interna spirito de niaj societaj kunvenoj? Ĉu la partopreno en ĝi ne estas kelkafoje por la ekonomie vivanta homo (kaj kiom da inter ni estas riĉaj je libera tempo?) tute malutila?

Kia estas la ĝusta vojo de idealo al realigo?

Cu ne estas iom pripensinda tiu ĉi malgaja meditado?

ooo

LIBERECO KAJ PENSADO.

El ĉefa verko »Utopio« de Emil Svoboda tradukis Jos. Eiselt.

Jen la demando: »Kial vi batalas por libereco de pensado? Por kio vi tiun ĉi liberecon bezonas?« Kaj tre diversa estas la impreso, kiel ĝi influas diversajn homojn. Unuj forspiras kaj diras: »Laŭ mia gusto vi ekparolis. Kia libereco! Nur al malboneco kondukas tiu via libereco!« Aliaj levas la ŝultrojn, swingas malrespekte la manon: »Naivajoj! Bona homo rigardas serioze la mondajn kondiĉojn sin per seriozaj aferoj. Por vanaj pensoj li domagas tempon.« Kaj aliaj estas per la demando direkte ofenditaj: »Kiel vi povas tiom absurde demandi? La libereco de l' spirito — la plej sankta donaco de la vivo! Kiel ne batali, por ke ni tiun donacon akiru?«

De la plej profunda malspriteco ĝis la plej sankta entuziasmo — kia skalo de nuancoj! — Kaj tamen ĉiu el ili devus per tiu demando turniĝi al si mem kaj devus al si honeste kaj klare respondi. Jes, ĉiu, kiu batalas por libereco, ĝi estu en kiu ajn flanko de la kultura batalaĵo devus sin demandi: »Por kio ni bezonas tiun liberecon?« Li ekkonus, ke la akiro de libereco ne estas la kulminacio kaj fino, sed la komenco de laboro. La libereco havas nur negativan valoron. Ĝi demetas katenojn, forigas la spite starigitajn malhelpaĵojn, haltigas

la persekutadon de tiuj, kiuj alimaniere pensas. Sed pozitivan valoron alportos en la aferon nur tiu, kiu respondos al si tiun tragikan demandon, kiu ekkonscios, kiel oni devas la liberecon apliki, kaj kiu decidiĝos batali por nova enhavo de liberigita nacia kaj ŝtata vivo. En tio, kiel homo la liberecon eluzis, aperos, ĉu li estis inda je ĝi.

Tial, se ni parolas pri spirita kampo, ni metas post la vorto »libereco« pluan diron »de pensado«. Pensulo ĝenerale kaj sekve eĉ libera pensulo ne estas kiu ne pensas. Komprenoble, ĉiu pensas. Pri siaj zorgoj, pri »aferoj«, pri gajaj kaj malgajaj okazintaĵoj, pri siaj malsanoj, pri mono kaj aliaj ĝuoj... Sed ĝi ne estas »pensado« en nia vortsignifo. Li ja povis pri tiuj ĉi aferoj pensi hieraŭ kiel hodiaŭ: por tio ne estis bezonaj bataloj pri libereco de pensado. Ni volis ĝuste pri tiuj demandoj libere pensi kaj niajn pensojn propagandi, kiuj estis per ekstera forto el penskampoj elimititaj.

Ni volis konsideri tie, kie oni ordonadis senspritan, malsaĝan kredon. Ni volas libere pripensi tion, kion solvas el profesio la instruistoj de historiaj sistemoj religiaj, ni volas esplori tion, kion oni antaŭe simple kredis. Ni volas malkaŝi erarojn kaj superstiĉojn, prezentatajn kiel vero, liberigi la spiriton por malligita flugo en altaĵojn, al kiuj alvenis grandaj instruistoj de l' homaro. Ĉiu ne estos kreanto; sed estos kreskantaj amasoj da serĉantoj la veron, kiuj faros al si propran pensmondon el tio, kion ili en diversaj sistemoj trovas granda kaj bela. Dume multaj sur vojo de libereco haltos ĉe tiu ĉi aŭ tiu historie produktita, fermita sfero: aliaj formos el diversaj elementoj propran sistemon kaj ne rifuzos ideon tial, ĉar ĝi eble devenas el fonto mallaŭdata de eklezio antaŭe reganta. Sen antaŭjuĝo, kun deziro je pli alta ekono, ili alpaŝos al doktrinoj orientaj kaj okcidentaj, ili ekvidos, kio estas komuna ĉe la plej grandaj pensgeniuloj, kaj tion, en kio la vojoj diversas, por supreniri pli proksime al antaŭento de l' vero aŭ malsupreniri en mallumojn kaj superstiĉojn.

Spirite libera homo ne rigardos la stelojn el profunda sakto de obstina kaj disputema eklezia vidpunkto, sed de liberaj pintoj montaraj. Li vidos senlimajn horizontojn, li vidos grandiozajn vojojn, li vidos ankaŭ tion, kiel la profunde konsideranta spirito haltas sur scilo, post kiu etendiĝas la regno de la Nekonato. Unu haltas por kolekti spiron kaj poste etendi la limojn de la scio kaj trapetiri en regionon ĝis nun nekonnatan; alia ĝin nomas »nekoncnebla« kaj deturnas sin al la vivo, al praktika klopodo pri morala levado de la homa amaso. Sed ĉiu el ili eksentos nobligantan, purigantan spirblevon de l' universo, li ekkonos, kio estas la vivo sub vidangulo de eterneco — sen frenezjako de konfesiaj antaŭ-

juĝoj; eterneco, kiu ne bezonas profesiajn peristojn, sed parolas al homo direkte, per lingvo, kiu ne havas kaj ne bezonas vortojn.

La libereco ne estas zenito kaj fino: ĝi estas kondiĉo kaj komenco de libera ekflugo de penso, de ĝia vojo al nevideblaj altecoj kaj profundejoj de ekkono. Sed se ni volas konservi la malfacile akiritan liberecon, ni devas en la plej vastaj rondoj proklami la devizon: estas bezone pripensadi; la maldiligenteco en pensado estas pruvo, ke la libereco estas senutila; amaso ne pensanta estas sur vojo sub novan jugon!

Ni devas instrui, sed tiel, ke ni instigu la pensadon, sed ne ke ni ĝin anstataŭu per heredita saĝeco.

Tio estas ankaŭ la celo de tiu ĉi artikolo: ĝi volas instigi la pensadon, ĝi volas ekveki la amon al konsiderado pri aferoj superpersonaj, pri vojoj al nova homo kaj al nova vivo.

o o o o

LEGOLIBRO.

KIEL TURKO SCIIS ŜPARI LA MONON.

Antaŭ la mondmilito vivis en Parizo iu turka potenculo, kiu posedis multe kaj multe da milonoj. Malgraŭ tio li estis tre ŝparema kaj ĉiusemajne li trarigardadis la kalkulojn kiujn oni prezentis al lia mastruma estraro. Kelkfoje li trovis en la kontoj la elspezitan ŝumon de tri frankoj por viando, per kiu oni nutris ok katojn en lia domo por gardi kelojn de amaso da ratoj kaj musoj. — Iun tagon li prenis en la manon la kranjon kaj strekis la menciitan ŝumon dirante: »Se la katoj efektive manĝas la ratojn kaj musojn, — tiam pro kio aĉeti la viandon por ili?« opiniis la saĝa turko. »Se ili ne manĝas ilin — kial vivoteni la katojn?« — En la nuna tempo kiam oni tiom multe parolas pri ĉiusepeca ŝparado, estus bone pripensi ĉi tiun instruoplenan anekdoton. — Kb.

KION LA MANTELETO RAKONTIS.

En bele aranĝita vestejo de unu fama majstro de dancarto tronis sur ĉefa loko belega tabakkolora pelteto, kiu konsciante sian valoron, fiere rigardis la aliajn vestojn, konkorde ĉirkaŭ ĝi lokitajn.

Ĝia plej proksima najbaro estis hispana manteleto kun multvalora borderaĵo, sed ĝia supro jam estis tro senkoloriĝinta.

Tiu ĉi longe observis la fieriĝon de sia najbaro, sed fine al ĝi kliniĝante, ĝi flustris:

»Aŭdu, amiko, mian avertan admonon: „fieron sekvas falo“. Mi parolas nur pro sperteco, kiun mi akiris per dumviva migrado.«

»Ho,« diris moke la pelteto »ĉu vi volas esti moralpredikanto?! Tio min ne koncernas!«

»Ankaŭ mi tiel opiniis, kiam mi estis pli juna kaj vidu, kia mi fariĝis, mi, kiu devenas el unuaranga pariza salono. Mi fieriĝis sur ŝultroj de mondkonata artistino. Mi ŝin akompanadis dum ŝiaj vojaĝoj, vidis grandan parton de l' mondo — kaj kiom da aventuroj mi travivis!«

»Aventuroj«, ripetis la sciavida pelteto. »Mi petas, rakontu, ni tiel agrable pasigos la longan tempon ĉi tie.«

La manteleto ne lasis sin du foje instigi kaj per maljunuleca voĉo ĝi komencis rakonti:

»Jes, estis tiam tempoj enviindaj. Maljuna generalo, kiu edziĝis je mia sinjorino, estis onklo de eleganta husara ĉefleŭtenanto. Kia miro, ke la junulo kaj mia estrino baldaŭ ekplaĉis unu al la alia. Kiom da fojoj mi ripozis sur lia brusto, kiam li ĉirkaŭbrakis la general-edzinon, fiustrante al ŝi vortojn plenajn de arda kaj flama amo.

Foje, dum la vesperamuzado ĉe barono L., rimarkis la maljuna generalo la unuanfojon, ke la simpatio de juna »Marŝilo« al la onklo estas pli ol amikeca kaj de post tiu tempo li sekvis per okuloj de Arguso sian junan edzinon. Pli poste li malpermesis al la nevo ankau vizitadon de sia domo.

La junaj homoj provis interkomprenigadi per ĉiu ajn rimedo, sed pro multaj spionoj ili ne sukcesis. Fine estis akceptita alia ĉambristino, kiu estis sindona al sia estrino. Jen oni kompletis novan planon, kiu estis krononta la penadon.

Estis karnavalo, kaj en la domo de grafo S. oni aranĝis maskan balon. La juna husara oficiro ne estis en la urbo.

La generalo estante konvinkita, ke la nevo ne renkontiĝos kun lia edzino, petis ŝin partopreni la balon.

Goje faris la bela sinjorino la preparojn por la balo. Ŝi surhavis luksan tualeton de reĝino »Vintro«. La edzo vidante ŝin, estis ravita, ĉar li deziris al ŝi ĉiun amuzon, kiam li sciis, ke la nevo ne ĉeestas. Sed li ne antaŭvidis la saĝacon, aŭ pli bone mi dirus, la virinan ruzon.

En la salono ĉiu atentemo apartenis al la reĝino »Vintro«. Subite, kiam gastiganto kondukis la generalon al ŝaktabulo, malaperis la »Vintro« por reaperi post momento.

Observema okulo tuj ekrimarkis, ke tio ne estis nun la sama persono.

La origina reĝino »Vintro« vualita en domino ripozis en brakoj de Veneciano, aŭskultante la amkonfeson, kiu delogeme fluis el lia buŝo. Neniu suspektis ke postagmeze alvenis la ĉefleŭtenanto en la urbon por partopreni la vesperan balon.

»Kiel vi eksciis tion?« demandis senpacience la pelteto.

»La ĉambristino forportis min en la saloneton, kie estis la kunveno de la geamantoj,« respondis la manteleto.

»Post ne longe oni eksciis en la halo, ke la reĝino »Vintro« pro malsaneto forveturis.

Post iom da tempo eksciis la generalo, kion sciis sole mi. Li furiozis tiom, ke kaptinte revolveron li alcelis, kaj lia edzino falis teren morta. Poste li turnis la pafarmilon kontraŭ si. Nun estis fino de mia gloro, fino de ĉio. Aĉetis min en aŭkcio malnovaĵisto, ĉe kiu mi pasis longan tempon, ĝis mi estis aĉetita de mia nuna portantino, filino de l' oficisto, kiu min denove kondukis al taglumo. En ŝia familio mi pasigas jarojn de mia maljuneco. Kiel ofte mi rememoras la pasintan tempon, kiun mi neniam plu travivos! Vidu, amiko, kiel strangaj estas vojoj de la sorto. De l'

supro mi venis — ĝis tien ĉi. Pro tio mia averto ne estis sensignifa.«

La pelteto kapjesante enpensigis kaj silentis. En la vestejo nun regis silento, interrompata nur de tiktakado de horloĝo. —

Esperantigis Anna Ŝaudova.

KULTURO

Memorindaj datoj en oktobro: La 2. o. 1892 mortis Ernest Renan, franca filozofa. — La 4. o. 1896 mortis dro. Jul. Grégr, la fama ĉeĥa politikisto. — La 5. o. 1908 Bulgarujo sin deklaris sendependa reĝolando. — La 10. o. 1913 estis finita la kanalo de Panama. — La 11. o. 1424 mortis Johano Žižka apud Přebislava. — La 12. o. 1492 albordegis Kolumbus en Ameriko. — La 13. o. 1822 mortis Ant. Canova, la itala skulptisto. — La 15. o. 1900 mortis Zdeněk Fibich, la ĉeĥa komponisto. — La 16. o. 1827 naskiĝis A. Böcklin, la glora germana pentristo. — La 17. o. 1849 mortis B. Chopin, franca komponisto. — La 18. o. 1599 mortis D. A. el Veleslavin, ĉeĥa verkisto kaj presisto. — La 19. o. 1813 okazis la »batalo de nacioj« apud Leipzig. — La 20. o. 1770 naskiĝis J. Drašković, la kroata nacia vekanto. — La 22. o. 1811 nask. Fr. Liszt, la glora virtuozo. — La 24. o. 1526 elektis la ĉeĥaj nobeloj Habsburgojn sur la ĉeĥan tronon. — La 26. o. 1787 nask. Vuk. Karadžić (Karagiĉ), la aŭtoro de la nova serba ortografio. — La 28. o. 1918 estis deklarita Ĉeĥoslovaka sendependeco (nacia festotago en Ĉs.) — La 30. o. 1724 nask. K. Linné, la natursciencisto. — La 31. o. 1821 nask. Karel Havlíček Borovský, la fama ĉeĥa gazetisto.

LA PLEJ MALGRANDAJ MALMIKOJ KAJ AMIKOJ.

I.

Tre ofte oni kutimas diri, ke la homo estas ĉiopova ĉeĥo de la naturo kaj ankoraŭ pli grandaj fieruloj certigas, ke ĉio estas al la homo disponebla. Sed prave iuj diras ke ne ekzistas pli granda malsaĝeco; kaj kiel malfora estas homo kontraŭ potenco de l' naturo, pri tio konvinkas nin ekzemple epidemiaj malsanoj. Mi nomas nur ĉefajn: itizo, morbito, tifo k. t. p. Longa estus la vico... Kaj ĉiu el tiuj malsanoj havas bazon en malgranda organismo, nevidebla per okulo, kiun ni nomas bacilo. Kiel ofte estas tiu mikroskopa bacilo kaŭzo de morto de multegaj homoj, glori aŭ nekonaŭtaj, junaj kaj maljunaj! Unusola de ili memkompreneble ne povas kaŭzi katastrofon, sed ni imagu, ke baciloj multiĝas tre rapide. Tiel ekzemple iuj el ili povas dum tago 55 foje multobliĝi kaj tiamaniere el unu bacilo povas esti $2.55 = 36030$ bilionoj da bakterioj nur dum unu tago.

Sed nur ili ne estus tiel danĝeraj por nia vivo. Ili produktas venenojn, nomitajn toksino kaj oni kalkulis, ke 0.00023 g da tiu veneno sufiĉas mortigi maturan homon en la tempo tute nelonga. Tiuj estas teruraj malamikoj. Iliaj korpecoj havas preskaŭ neniun pezon, akvo, vento kaj insektoj ilin facile forportas de loko al loko, ni enspiras ilin, ni povas diri, ke ili estas ĉie. Sed ankau niaj korpoj, precipe la sanaj, batalas kontraŭ ili. En nia

sango ekzistas du specoj de malgrandaj korpetoj, eritrocitoj kaj leŭkocitoj. La lastaj estas malamikoj de baciloj. Kiam penetras kia ajn bacilo en sangon, tuj ĉirkaŭ ĝi amasiĝas leŭkocitoj, englutatas ĝin kaj en sia korpo per antitoksinoj mortigos. Sed alia rezultato estas, kiam homa korpo estas malfortigita de alkoholo kaj fumado. Tiam la leŭkocitoj estas malmultaj, senfortigitaj, malsano povas progresi kaj laŭ cirkonstancoj ankaŭ mortigi la homon. Sed en tiuj kazoj helpas medicina scienco. Ĝi per vakcinsero subtenas la korpon en produktado de protektaj materialoj. Tiel protektas homon sero kontraŭ tifo, ĥolero, kaj aliaj malsanoj. Ni vidas ke bakterioj estas niaj malamikoj, kaj multfoje per higieno kaj bona vivmaniero ni povas eviti de multaj malagrablaj malsanoj.

II.

Ni turniĝu al niaj plej malgrandaj amikoj. Tiuj estas ankaŭ bakterioj, ne miru! Ili estas tre gravaj en agrikulturo por niaj kampoj, herbejoj, arbaroj. Ekzistas specoj, kiuj povas asimili nitroĝenon rekte el aero. Tiu ĉi gaso estas utiliga al cerealoj. Sen ĝi estus sekalo malgranda, ĝiaj spikoj kaj greneroj pigmeaj. Tiujn bakteriojn ni nomas sience nitrosomonas. Per ilia agado amoniako oksidiĝas kaj devenas multaj materialoj utilaj al kreskaĵoj. Tiuj estas necesaj, kaj ĉar ili vivas sur radiketoj de trifolio, medikago kaj pizo, oni iam antaŭ longa tempo ekkonis, ke estas bone semi tiujn kreskaĵojn kaj ŝanĝi ilin post kelke da tempo per aliaj. Kaj fine ni mem ofte uzas bakteriojn al preparado de diversaj trinkaĵoj. Tiel ekzemple en Rusio el lakto de ĉevalinoj oni preparas trinkaĵon kumison, en Bulgario estas nacia trinkaĵo jogurto. Tio estas lakto, en kiu per fermento de bakterioj estas granda kvanto da laktacido. Meĉnikov kaj Pasteur argumentis, ke tiuj trinkaĵoj estas tre sanaj, ĉar ili mortigas bakteriojn vivantajn en homaj intestoj. Antaŭ nelonge franca scienculo d' Hérèlle publikis sian verkon pri organismoj, kiuj laŭvorte manĝas bakteriojn. Ĝi estas preskaŭ per mikroskopo nevideblaj. Kaj tiel homa scienco gajnis eble la plej malgrandajn amikojn. —

M. U. C. Riedl L.

○○○○

ĈEĤOSLOVAKIO.

Nova ministraro. La 7. de t. m. s-ro prezidento de la respubliko nomis jenan ministraron: Prezidanto: Švebela Ant. (respublikano); Interno: Matyáš Jan (resp.). Nacia defendo: Udržal Frant. (resp.). Agrikulturo: Dro. Hoďža Milán (resp.). Eksterlando: Dro. Beněš (neutralo). Fervojoj: Štrábrný Jiří (nacia socialisto). Provizado: Dro. Franke Emil (nac. soc.). Poŝtoj: Tučn ý Alois (nac. soc.). Lernejoj: Běchyně Rud. (sociala demokratio). Socialaj aferoj: Habrman Gustav (soc. dem.). Publikaj laboroj: Srba Ant. (soc. em.). Legounuigo: Markovič Ivan (soc. em.). Financoj: Dro. Rašín Alois (nacia demokratio). Komerco: Novák Ladislav (nac. em.). Justeco: Dro. Dolanský Jos. (kristn. soc.). Higieno: Monsignore Šrámek Jan (rist. soc.). La ministro por lernejoj estas fara al Esperanto.

Germanoj kontraŭ prezidanto Masaryk.

Germanaj membroj de la urbestro en Znojmo (Znaim) decidiĝis ne bonvenigi prezidanton Masaryk, kiam li vizitos tiun urbon. Pri tio skribas »Národní Politika« (unu el ĉefaj gazetoj ĉs.): »Ĝi estas decido ne aŭdita! Kiu legis iam en historio de klera nacio, ke la elektitaj reprezentantoj de tiu aŭ alia korporacio socie falis tiom profunde kaj morale, decidinte publike ofendi la alvenontan gaston kaj ke kun granda tamburo ili vokis ĉi tiun sian moralan skandalon en la mondon. Kiel alie kondukis ĉe tiu ĉi malinda malnoblo la vera inteligenteco de nia prezidanto kaj de la tuta registaro. Ili malatentis ĝin trankvile, ĉar klera homo en similaj okazoj havas sian penson...«

Jindřich Fügner. La 12. septembron Ĉeĥoslovakoj dankeme memoris la centjaran naskiĝdaton de la viro, al kiu ili ŝuldas la iniciativon de grandioza ideo pri organizo de la socio, kiun neniu alia povas superi. Oni memoris la kunfondinton de la organizaĵo »Sokol«, Jindřich Fügner. Li estis hopatro de sia juna helpanto Dro. Miroslav Tyrš. Deveninte el riĉa familio, li havis eblon klerigi per vojaĝoj tra la mondo kaj tiam en Italujo li konatiĝis kun popolklerigaj celoj de italaj patriotoj. La politika vivo en la jaro 1848 kaj la rilatoj kun la ĉefaj patriotoj hardigis en li la ideon formi potencon popoledukan organizaĵon. Post multaj preparoj li fondis »gimnastikan unuigon en Praha«, (kies unua prezidanto li fariĝis la 10. februaron 1862), kiu fariĝis ĝermo de la potenca organizaĵo sokolara, konata en la tuta mondo. »Sana spirito en sana korpo«, jen la fundamenta ideo de sokola agado, ĉar nur tio estas admirinda kaj nur tio ne mortas, kio bazas sur klereco


DIVERSAĴOJ


Niaj legantoj bonvolu nin informi pri la kursoj kaj pri la poresperanta laboro en ilia loko, ĉar ni deziras per nia gazeto prezenti la plenan skizon de ĉs. esp. movado. Al la afablaj kunlaborantoj ni antaŭe kore dankas!

Nian proponon pri prunto de skribita parolado pri Esp. akceptis tiom multaj amikoj, ke ni ne povis ĝis nun kontentigi ĉiujn, ĉar ni posedas nur kelkajn ekzemplerojn de la parolado. La prunto-prenintojn ni petas resendi ilin baldaŭ, por ke ni povu kontentigi la aliajn!

Multaj sciigoj, jam kompostitaj, ne povis aperi en tiu ĉi numero pro abundeco de presmaterialo. Ili aperos en venonta numero.

Esperantista Rondeto en Slezská Ostrava aranĝas la 21an de oktobro t. j. ĉeĥo-esperantan vesperon kun riĉa programo, kaj invitas la ĉirkaŭajn gesamideanojn viziti ĝin. Samtempe ni aranĝas esper. ekspozicion kaj ni petas ĉiujn samideanojn prunti al ni esperantaĵojn, kiuj estas poste redonitaj. Esperantaĵojn bonvolu sendi al prezidanto sro. Alois Kubala, Sl. Ostrava 329.

Esperanto Triumfonta, la sola semajna gazeto esp. aperigis sian centan numeron la 3. de sept. t. j. Ĝi meritas subtenon de ĉiu esperantisto.

El la familio de Progresanoj. Verkistino s-ino. A. Kožmínová, nia redakcia kunlaborantino, ek-

funkciis kiel direktorino de knabina azilo en Ledeč apud Smečno. — S-o Al. Loukota, bankoficisto kaj fakturisto de nia gazeto odziĝis civile kun f-ino Bruknerová. — Sinceran gratulon!

La Popola Universitato de Hus en Plzeň akceptis en sian programon ankaŭ instruadon de Esp. Nuntempe ĝi aranĝas tri kursojn: por komencantoj, por progresintoj kaj preparan kurson por ŝtataj ekzamenoj el Esperanto. En la du unuaj estas la instrua lingvo la ĉeĥa, en la tria Esperanto. En la venonta jaro la Universitato aranĝos komunan ekskurson de la partoprenintoj de la esp. kursoj al Nürenberg. De la 21.—29. de t. m. ĝi aranĝas ekskurson de esperantistoj al Bruxelles, Ostende kaj Antwerpen por viziti tieajn esperantistojn. — Estas rimarkinde, ke la prezid. de tiu ĉi instituto ne estas favora al Esp.

Lektore de Eŝperanto ĉe la alta teknika lernejo en Praha estis nomita s-o prof. A. Pitlík, laŭ la decido de profesoraro farita la 4a okt. t. j.

Prepara kurso por ekzamenoj el Esperanto ĉe la ŝtata ekzamena komisiono komenciĝis en Praha la 10. t. m. Instruas f-ino J. Šupichová, nia senlaca propagandistino.

○○○○

LABORISTA LIGO ESPERANTISTA.

(La raportojn por tiu ĉi rubriko oni sendu plej malfrue ĝis la 10. de ĉiu monato al k-do J. P e c h, Plzeň, Houškova ul. 4.)

Raporto pri la kongreso de S. A. T. en Frankfurt a. M. aperos en venonta numero!

Labриста asocio esp. en Plzeň-Letná, sekcio de L. L. E., danke kvitas mondonacojn al ĉiuj esp. grupoj, kiuj helpis malgrandigi la eispazon, aperintan al ni por renovigo de esp. informa surskribo je frontono de la domo apud la fervojlinio de Plzeň al Praha. Mi estis: Esp. klubo de Plzeň 50 Kč, Lab. Ligo Esp. kun ĉefprezidejo en Plzeň 50 Kč, Esp. Asocio en Doubravka, sekcio de L. L. E. 50 Kč, Esp. Asocio en Újezd apud Plzeň, sekcio de L. L. E. 30 Kč. Ankoraŭ unufoje ni al ĉiuj esprimas sinceran dankon! Por la komitato: A. Rendl, t. t. prezidanto.

Dum la kongreso en Frankfurt estis fondita Ligo de esp. instruistoj, kies celo estas zorgi pri bona stilo de Esp. La esp. instruistoj ei Ĉs. R. aliĝu pere de Lab. Ligo Esp. en Plzeň, Peko.

Nekrologo. La 30. jul. mortis post longa malsano la bibliotekistino de L. L. E. s-ino Ludm. Trávníčková. Pro sia fervoro al nia afero ŝi estis ŝatata de ĉiuj membroj.

BIBLIOGRAFIO

J. Šupichová: Esperanto. Mluvnice, výbor článků a slovník esp.-český. Eld. de Šolc a Šimáček, Praha. Stran 120, 11×18 cm. La libro de nia fama propagandistino jen prezentiĝas en sia tria eldono, kiu kompare kun la du unuaj estas

riĉigita je novaj tre interesaj artikoloj. La gramatikaj partoj de Esp. estas jen precize klarigitaj kaj ankaŭ la instrua sistemo estas eminenta. Tial ni ĝin varme rekomendas. Ĝi kostas 10.50 Kč. — *BES-a Adresaro* de Esperantistoj el ĉiuj landoj. Eldonita de Bohema Esp. — Servo, Moravany. Kvara eldono (1922—23), paĝoj 68, 12×15 cm. Prezo 12 Kč. Jen libreto tre taŭga, kiu pro sia precizeco jam akiris bonan famon. Ni ĝin varme rekomendas.

M. L. Kapian: Akordoj Esperantai. (Esperanta Librotrezoro No. 2) Bialystok 1922. Formato 10¹/₂×17; 32 paĝoj kaj kovrilo. Eldonejo: J. Šapiro, Lipova 33 Bialystok (Polujo). Prezo 4 respondkuponoj afrankite.

○○○○

DEZIRAS KORESPONDI.

(La enpresado kostas 2 Kč.)

(Klarigo: kor. = korespondas, int. = interŝanĝas, L. = leteroj, I. K. = ilustritaj kartoj, P. M. = poŝtmarkoj, G. = gazetoj, S. M. = sigelmarkoj.)

Labриста Ligo Esp., sekcio Doubravka deziras interŝ. p. k., markojn bildfl. Adreso: F-ino Milka Šlajsová, Doubravka apud Plzeň, Podlest ĉ. 293.

S-ro Anatolij Voroncov, selo Usolje, Irkutska guber., **Bolŝaja**, Bazarnaja ulica.

S-ro Andreo Slobodĉikov, selo Usolje, Irkutska guber., **Bolŝaja**, Bazarnaja ulica.

○○○○

La rezultato de niaj konkursoj.

Konkurso I. La redakcio aljuĝis la premion da 100 Kč al la felietono subskribita per pseŭdonimo Sen-tema Sen-temulov. Ĝi estas enpresita en tiu ĉi kajero. La aŭtoro (Pola samideano) bonvolu anonci al ni sian adreson. Laŭdan mencion meritas la verketo »Sunĉo de oriento«, kiu estus presinda, se la aŭtoro estus evitinta frazojn, kies enhavo ne estas klara. Post la korekto ni estas pretaj ĝin enpresi.

Konkurso II. El la solvintoj estis lotumitaj jenaj sinjoroj: Emil Wanitsek el Bratislava, Arnošt Janečka el Vítkovice, Alois Kubala el Slezská Ostrava, Frant. Klenka el Bohdaneč kaj MUDr. V. Austerlitz el Bardiöv. La bildon ni sendos al ili en venontaj tagoj.

La III. Konkurso.

Skribu anekdoton, originalan aŭ tradukitan en amplekso de 10—30 linioj (malgranda literotipo) de »La Progreso« kaj sendu ĝin al nia redakcio. Tempolimo: 2. decembro t. j. Premioj: Kvin plej interesaj anekdotoj estos rekomencitaj per libro »Universala legolibro«, recenzota en venonta kajero: Partopreni povas eĉ komencantoj, ĉar gramatikajn kaj lingvajn erarojn korektos la redakcio.

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul. 10. Presis laborista presejo, Plzeň.